# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 14/10/2021 Kvincentkvindekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu** ***Google Translate*** **kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 811,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **281,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **226,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **198,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **106,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde marto 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



bildo sendis Vera Payne

**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.

**Esperanta Retradio**

Vikipedio 20-jara

5a oktobro 2021



**3ZZZ** "En la elsendo de la 11a de oktobro Zofia Korody prezentas la Esperanto -urbon, Herzberg, Oŝioka Taeko klarigas kiel ĝi kolektis 110 000 subskribojn kontraŭ nukleaj armiloj . Aldone troviĝas kelkaj eroj por la literaturoŝatantoj"



*Franciska Toubale*

# Gratulon por la 10 jara jubileo de AE eldono!

Via penado kaj daurigado certe farĝis nian esperantujon pli bona kaj inspira mondo. Multajn dankojn al vi!

Jes, la ideo de Universala Baza Enspezo estos tre taŭga por plibonigita kaj aktiva mond-ekonomio, kaj por malhelpi ke la registaroj de super milita-forto vendu kaj donu militajn armilojn al landoj, kiuj ne kapablas aĉeti eĉ esencaĵojn.

Amike *Marumi Smith*, Viktorio

# Universala baza enspezo (UBI)




Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Ĝi helpus monon flui tra nia ekomonia sistemo sen senutila laboro

Ekonomioj funkcias per la fluo de mono.

Universala Baza Enspezo ebligas ĉiujn havi monon por helpi la fluon de mono.





Erhard, Johano kaj Linda


La unua bildo montras BES MEMBROJN Doug, nova Esperantistino Tara kaj Paŭlo studas la INTERNACIAN LINGVON kadre de nia septembra kunveno en la Brizbana Biblioteko.



# Oportuno de Amikumo kun Esperantistoj en Azio

Invito al la Aŭtuna Virtuala Kurskunveno de EPA (Esperanto-Populariga Asocio)

Datoj Sabato-Dimanĉo 30-31 Oktobro 2021




Partoprenantoj: el Mongolio, Nepalo, Koreio, Tajvano, Aŭstralio kun la japana grupo

Loko: Zoom

Kosto: AUD$20

Programo (AEDT-Australian Eastern Daylight Melbourne Time)

| **Sabato 30 Oktobro 2021** | **Dimanĉo 31 Oktobro 2021** |
|---|---|
| 3:00 -3:30 ptm Aliro al Zoom<br>3:30 – 5:00 ptm Preĝo+Malfermo<br>4:00 -7:00 ptm Kurso 'Ni parolu per E'<br>Faciligantoj ①Takashi Ago (Japano)<br>②Kim Seonwook (Koreo)<br>7:00 – 9:30 ptm Ripozo<br>9:30 – 11:00 ptm Interŝanĝa kunveno<br>nur por tiuj, kiuj deziras | 10:30 - 11:00 atm Aliro al Zoom<br>11:00 atm– 1:30ptm Kurso 'Niparolu per E'<br>Faciligantoj ①Takashi Ago (japano)<br>②Teddy Nee (Indoneziano)<br>1:30 -3:00 ptm Ripozo<br>3:00 -5:00 ptm Kurso 'Ni parolu per E'<br>Samaj faciligantoj en du ĉambroj<br>5:00 -5:30 ptm Fermo+Preĝo |

## Organizanto-Esperanto-Populariga Asocio

Ten'on-kyo, Kameoka -Shi, Kyoto-Fu Japanujo

Email: oficejo@epa.jp www.epa.jp Tel: 001181-771-56-9074

Bonvolu kontakti *Marumi Smith* (EPA kontakto en Aŭstralio, se vi volas aliĝi al ĉi tio kurso.


marumi@marumismith.com.au Telefono: 0409 336 861

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 56 de "Por Komencantoj".




GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la preskaŭ perfekta verbsistemo de Esperanto ekzistas nur kelkaj kazoj de kompleksaj verboj: unue la verbaj kombinaĵoj kun unu el la ses modalaj helpverboj "povi, k.t.p." aŭ kiel precipa verbo de kombinaĵo kun verba sufikso: "mi manĝemas; la fiŝo manĝindas; la frukto manĝeblas; la viando manĝendas, kaj mi manĝigis/manĝatigis la kokinon". En ĉiuj aliaj kazoj kompleksaj tempoj esprimiĝas per adjektivaj predikativoj ("Ni jam estas ricevintaj la leteron").

Demandoj: A). Kiuj el la nomitaj verbaj sufiksoj estas pasivvoĉaj?

B). Kio estas la gramatika diferenco inter "Mi manĝemas" kaj "Mi estas manĝema"?

2). Ankaŭ en la pasiva voĉo la singulara ago esprimatas per nur unu vorto, nur unu verbo: "Morgaŭ la fiŝo MANĜATOS de ni", ĉar temas pri nur unu, pasiva, ago (manĝati). Zamenhof kaj ankoraŭ multaj malmodernaj Esperantistoj diris, malĝuste, "Morgaŭ la fiŝo estOS manĝATA", malĝuste ankaŭ jam laŭ Kalocsay, ĉar tio signifas nefinitan agon. Alia ekzemplo: "La ŝtono sur la marbordo LAVATIS de la knabino". La samo okazas ĉe la mediala voĉo: "La ŝtono sur la marbordo LAVIĜIS pro la akvo kaj pro la vento kaj pro la suno, aŭ pro ĉiuj', aŭ simple "La ŝtono laviĝis".

Demando: Ĉu Zamenhof uzis por la pasiva voĉo unu aŭ du vortojn (verbojn laŭ li), kaj por la medialo unu aŭ du vortojn (verbojn, li diris)?

Notu ke "lavigas" NE estas gramatika voĉo; nur lavas kaj lavatas kaj laviĝas estas.

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 552.

*Marcel Leereveld.*

---

**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;

---

## Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.

*Australian Citizens Party* *View Email in Browser (enudgemail.com.au)*

Ankaŭ *the Socialist Equality Party, SEP* La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn

*Roger Springer*

---

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**

1). A). Pasivvoĉaj estas: (manĝ)ind(as); ebl; end; (at)ig.

B). "Mi manĝemas" = simpla verbo. "estas manĝema" = predikativa predikato.

2). Por la pasiva voĉo li uzis du vortojn ("estos manĝata");

por la mediala voĉo li uzis unu vorton ("manĝiĝos"). *Marcel Leereveld.*

---

# Allah kaj Dio.

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



**KRUELECO.**

Ni sentas en nia menso kion ni volas senti, sed ankaŭ kion nia korpo, inkluzive de nia menso, volas ke ni sentu, sen nia deziro. Tiuj lastaj aŭtomataj sentoj, ne kaŭzataj de nia konscia volo, estas ofte neagrablaj, ĉar nia menso sekrete kreas ilin, kvazaŭ kreitajn de Dio. En tiaj kazoj la sentoj eble devigas nin voli feki en neoportuna momento. Kelkfoje piloloj ekzistas por neniigi tian senton.

Unu tia sento, nekreita de nia volo, estas sekse enamiĝi en alian personon. Tio ne okazas, ĉar ni iun momenton eksidas kaj diras al ni mem "Mi volas enamiĝi". La enamiĝo estas same kreata kiel la sento de nutra malsato, decidata de la naturo. Ĝi tial estas "de Dio instigita". Se mi sentas ke mi devas feki mi havas similan sendependan problemon kiel se mi sentas neceson sekse rilati al alia persono. Ĉu iu rajtas puni min ĉar mi serĉas necesejon? Ĉu iu rajtas puni min ĉar mi enamiĝis? Se la naturo diras, ke mi devas feki, mi faros tion. Se la naturo diras, ke mi devas sekse rilati al iu persono, mi faru tion. Eĉ se mia korpo ne trovas necesejon, kaj eĉ se mi havas edzon aŭ edzinon, ĉar temas pri "la volo de Dio". La rezulto estas multegaj problemoj kaj la ekzisto de grandega monda literaturo. Sed simple diri "mi ne amas" estas same neebla, kaj same konsekvenca, kiel diri "Mi ne fekos". La homo kreis pilolojn por ne necesejumi, kaj kreis regulojn, kaj leĝojn, por malebligi nin realigi nian amon. Sed la amo mem ne estas malbela, ĉar ĝi estas natura. Kaj la reguloj kaj punoj povas esti bonaj aŭ malbonaj. Sed la amo ne malaperas el la trafita homo. La homo eble ne kontentigas sian amon, sed ĝi tamen restas kun ŝi aŭ li. Oni devas konscii pri tio. *Marcel Leereveld.*

Proksimsemajne aperos, post ĉi tiu enkonduko, artikoleto pri "Allah kaj Dio kaj krueleco".



# La Manlia Esperanto-Klubo



## Rekomencas siajn kunvenojn

La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj
La 16a de oktobro estos la tria sabato. . *Roger Springer*

